Dep. legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

3ª jaro Septembro 1989 Numero 16 (4)

49ª Hispana Kongreso de Esperanto



PARTO EL LA KONGRESANOJ POZANTE ANTAŬ LA BILBAO-A URBODOMO.
POSTE ILI ESTIS AKCEPTITAJ DE L´ URBESTRO.

DANKON!.- Post du monatoj de la fino de la 49-a Hispana Kongreso, al tiu-ĉi L.K.K. nur restas danki ĉiujn helpojn ricevitajn, jen de Institucioj, jen de H.E.F. (kies "du prezidantoj", Sroj. Aragay kaj Alonso, daŭre kaj detale sciis pri niaj streboj), jen (kaj ĉefe) de ĉiuj kongresanoj, sen kies ĉeesto la aranĝo restus sencela.

Aparte ni devas mencii al tiuj kiuj venis el eksterlando, suferante ĝenan kaj pezan vojaĝon por nur viziti nin: Sro. Amador Díaz, kiu tiel aktive partoprenis la Kongreson; Sro. Castillo, Prezidanto de Kuba E-Asocio; la simpatiaj geedzoj Wylleman, el Belgio; niaj amikinoj el Bulgario; nia pola amikino Jolanta Uzlis, kiu tiom helpis nin; Sro. Decobert kaj edzino, el Francio; la simpatia familio Pi-Solís, el Kanariaj Insuloj, ne eksterlandanoj, sed kiuj venis de tiel malproksime; la portugaloj, ...

DANKON AL ĈIUJ !

* * * * * *

TIU-ĈI ESTOS LA LASTA "NIA PONTO" kiun vi ricevas, kiel kongresano. Ekde via aliĝo al la Kongreso, nia modesta revuo "NIA PONTO" akompanis vin kun diversaj novaĵoj pri niaj laboroj, demarŝoj kaj streboj. Sed ĉio finiĝas. Hodiaŭ, kun nostalgio, kiel okazas en ĉiu adiaŭo, ni devas simple diri: ĜIS!.

* * * * * *

KONGRES-DOKUMENTARO.- Tiuj kongresanoj, kiuj pro iaj kaŭzo ne povis ĉeesti la kongreson kaj deziras ricevi la kongres-dokumentaron, devas ĝin peti letere al:

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1º
48005-BILBAO

Post kelkaj tagoj, ili ricevos en sia hejmo remburse (ni enspezos la sendo-kostojn).

NEKROLOGO.- Ni konsterniĝis post alvena de terura lasta novaĵo: Sr-ino. Maria Angelova, fama operkantistino kaj bonega esperantistino el Sofio (Bulgario), mortis antaŭ kelkaj tagoj. Ĉiuj kiuj ĉeestis la kongreson memoros pri ŝia daŭra duonskizita rideto kaj pri ŝia aktiva partopreno en la oficiala malfermo de la kongreso. Ke ŝi pace ripozu!.


★★★★★★★

KONGRES-POŜTAĴOJ.- Okaze de la Kongreso, ni eldonigis jenajn materialojn:

* Kongresa poŝtkarto. Prezo: 20 ptojn.
* Stampitaj kovertoj, kun poŝtmarkoj pri Gerniko, lanĉitaj de la Hispana Poŝto en la jaro 1966-a. Estas tri malsimilaj kovertoj. Prezo: 100 ptoj. po koverto

Petoj: Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1º
48005-BILBAO






LASTAJ ALIGINTOJ (Ne aperintaj en la Kongreslibro)

KOMUNUMO	NOMO	ADRESO	URBO	Nº
-----	FRANCO RAMIREZ, Alberto	-----	-----	187
	GILPEREZ FRAILE, Luis	-----	-----	186
ASTURIO	ARGUELLES GARCIA, Julio	Fernández Ladreda, 10-5º F	33207-GIJON	172
BALEARAJ INS.	PALAO PONS, Rafael	San Clemente, 42	07003-MAHON	178
EKSTREMADURO	CABEZAS JIMENEZ, Francisco	-----	-MERIDA	183
GALEGIO	GONZALEZ GARDON, Peregrina	Donas-Gondomar (Vigo)	36388-DONAS	181
KANTABRIO	GUTIERREZ ADURIZ, Miguel	Floranes, 57	39010-SANTANDER	190
KATALUNIO	BERGUA ALLUE, Rosa	Cerdeña, 338-1º-2ª	08025-BARCELONA	152
	GOMIS DOMENEC, Luis	Cerdeña, 338-1º-2ª	08025-BARCELONA	151
	MARTIN RUEDA, Luisa	Crta. Rubí Camino Can Ametller, 13	08190-SANT CUGAT DEL VALLES	174
	SMITH, Antoinette	R. Ribatallada, 20-5º-4ª	08190-SANT CUGAT DEL VALLES	171
MADRIDO	CAMAZON GARCIA, José Miguel	Villasandino, 4	28011-MADRID	173
	RUIZ SIERRA, Juan Carlos	José Sánchez Pescador, 13-3º A	28007-MADRID	185
VALENCIO	HERRERO GARCIA, Rafael	Passeig de Russafa, 11-8ª	46002-VALENCIA	163
	MARTINEZ HERNANDEZ, José	Mediterráneo, 22-1ª	46011-VALENCIA	155
	PEÑA CASTELLANO, Mª Margarita	Castielfabib, 18-3ª-10º	46015-VALENCIA	188
VASKIO	ALCEDO ORUE, Mª Angeles	Iturribide, 98-2º Dcha.	48006-BILBAO	153
	AMEZAGA ASENSIO, Luis Mª	Estrada de Uri, 5	48990-GETXO	169
	ANGUITA PAREJA, Julián	Gordóniz, 28-1º Dcha.	48012-BILBAO	167
	CASTRO GONZALEZ, Mercedes	San Mamés, 38-5º int. izda.	48010-BILBAO	166
	DIAZ RODRIGUEZ, Salvador	San Roque, 8-1º	48920-PORTUGALETE	182
	GARCIA AYO, Gumersindo	Grupo La Florida, 14-4º Izda.	48920-PORTUGALETE	161
	GARCIA del VALLE, Fco. Javier	Amboto, 4-1º	48002-BILBAO	180
	GARCIA REDONDO, Isaac	Izaro, 20-7º A	48990-ALGORTA	165
	ITURRIOZ ALBERDI, Mª Luisa	Grupo La Florida, 14-4º zda.	48920-PORTUGALETE	162
	PEREZ ALDECOA, Adelaida	Juan de Urbieta, 12-10º D	48015-BILBAO	175
	PINEDO VADILLO, Mª Angeles	Mª Díaz de Haro, 32-6º	48010-BILBAO	156
	RODRIGUEZ DURAN, Mª Victoria	Barrio Fanos, s/n	48958-ASUA	154
	RUIZ NIEVA, Eulogio	Iberduero Residencial	48950-ASUA	170
	SARASUA FERNANDEZ, Joxemari	Estrada de Abaro, 13-5º Dcha.	48013-BILBAO	160
	SOTILLO CORDOBA, Plácida	Capitán Mendizabal, 26-6º Dcha.	48980-SANTURCE	164
	TERRONES SIMAL, Araceli	Machín, 10	48012-BILBAO	179
	URIBEECHEBARRIA, Gregorio	Abasota, 24	48990-GETXO	189

LANDO	NOMO	ADRESO	URBO	Nº
BULGARIO	DIMITROVA,	Hagi Dimitar, 2	5130-DOLNA ORJAHOVICA	159
	DIMITROVA, Darinka	Hagi Dimitar, 2	5130-DOLNA ORJAHOVICA	158
	NAKOVA, Veska	Lajos Kosut, 35	1606-SOFIA	157
FRANCIO	DECOBERT, Jako	45 Av. Béziou	64140-BILLERE	176
	TIRCAZES, Jeanne	45 Av. Béziou	64140-BILLERE	177
SOVETUNIO	KRAKOV, Raica	-----	LENINGRADO	168
USONO	PAWLAK, David	José Abascal, 28	28003-MADRID	184

LF-koop



ora team'
ora team'
ora team'
ora team'

TEAM'estas la nomo
de l' eslovaka rokgrupo
-tre popularaj en sia lando
kaj gepatra lingvo- kiu ĵus sur-
merkatigis internacie unu el la plej
bonkvalitaj kaj ege interesaj sonbendoj en
Esperantujo, "ORA TEAM'".

Profesie ludita kaj instrumente varie aranĝita, ORA TEAM estos "ora" frandaĵo por tiuj kiuj ŝatas rokmuzikon, kaj samtempe eksterordinara propagandilo por nia lingvo.

Prezo: 1.200 ptoj

PETU ĜIN ĈE LA GRUPO !

team'

team'

team'

team-ano j



NOVAJ E-KURSOJ.- La 2-an de Oktobro komencis novaj E-kursoj, gvidataj de nia laborema kaj ĉieestema amiko Iñaki Vélez.

Por ilin propagandi, ni eliris straten kun informtablo, sur kiu kuŝis diversaj Esperantaĵoj kaj propagandfolioj; ankaŭ ni aperigis anoncojn en ĉiuj ĵurnaloj kaj radiostacioj de Bilbao.

Tamen, via helpo por diskonigo de la kursoj inter viaj plej proksimaj konatuloj, ĉiam estos bonvena.

Kristnaska loterio.- Baldaŭ ĝi estos preta, do tiuj kiuj ĉiujare kutimas helpi en ĝia vendado, bonvolu veni al la Grupo post la 15-a de Oktobro, aŭ telefonu por informiĝo.

Ĉi-jare la numero estas: 05634

Dissendado de la videobendo "Vivi en Eŭskadi".- Pro tio ke Julie, neatendite, la Vaska Registaro sendis al ni 40 videobendojn kun la peto dissendi ilin, la afero ege prokrastiĝis. Tamen, ni jam komencis sendi ilin: unue, al naciaj asocioj kaj poste al gravaj E-Asocioj kaj aliaj grupoj kiuj petis ĝin. Do, atendu kaj ne malpacienciĝu.



MOSKVAJ NOVAĴOJ nun ankaŭ esperante

Moskvaj Novaĵoj
Glasnost (nekaŝado) ebligas, ke – se la esperantistoj volas – baldaŭ ili regule povos legi la konatan gazeton en la internacia lingvo. Aperis provnumero (sur la bildo ties frontpaĝo), kiun oni povas peti ĉe: Moscow News, Gorki str. 16/2, SU-103829 Moskvo, Sovetio. La 32paĝa provnumero enhavas ankaŭ parton pri Esperanto kaj literaturan suplementon. Redaktas la gazeton ne (kiel la versiojn alilingvajn) oficistoj de inform-agentejo Novosti, sed esperantistoj en propra respondeco. Dependos de la eĥo kaj apogo fare de alilandaj esperantistoj, ĉu realiĝos la plano pri regula aperigo de Moskvaj Novaĵoj.



CURSO DE ESPERANTO

"Método Bilbao"

(Por elementaj kursoj kun instruanto)

5-a eldono, 1989

50 paĝoj, 24 x 17 cm.

Eldonita de Grupo Esperantista de Bilbao kaj de antaŭ multaj jaroj sukcese uzita en niaj elementaj kursoj, jen nun ĝi estas ankaŭ de vi mendebla.

Petu ekzempleron!

Prezo: 300 ptoj po unu.

(15% rabato por minimuma aĉeto de 10 ekzempleroj.)